
21 Avril 1907.
N° 60.

21a Aprilo 1907. 60a Numero.
5a JARO, 12a NUMERO.

21e April 1907.
N° 60.




DUONMONATA GAZETO ESPERANTISTA.

# LA BELGA SONORILO

JOURNAL ESPÉRANTISTE BELGE
Bi-Mensuel.

BELGISCH ESPERANTISCH BLAD
verschijnende twee maal per maand

Oficiala Organo de la « Belga Ligo Esperantista » kaj de la Belgaj Ligaj Grupoj.

Organe officiel de la « Ligue Espérantiste Belge » et des Groupes Belges affiliés.

Officieel orgaan van den « Belgischen Esperantischen Bond » en der Belgische aangesloten Groepen.

## Vers la langue auxiliaire internationale. (1)

III.

### Application de la loi de causation au problème de l'enseignement des langues.

(*suite*).

J'ai la rancœur de devoir dire combien souvent, après avoir exposé à des « gens compétents » la question de l'esperanto, après leur avoir montré expérimentalement la solution de la question des langues, non-solutionnée jusqu'ici, il m'a fallu constater ou bien l'indifférence, ou bien, ce qui est pis, une sorte d'animosité, inconsciente je veux encore le croire, contre cette nouveauté qui était de nature à diminuer, par exemple, la valeur marchande d'un homme possédant trois langues modernes.

Le professeur de langues, l'ingénieur polyglotte, l'avocat polyglotte, etc... demeurent sous l'impression que leur statut social personnel serait amoindri, ce qui ne serait vrai que pour ceux qui ne devraient pas ce statut à une véritable valeur personnelle bien plus qu'à la possibilité d'être simplement des « interprètes ».

Le directeur d'enseignement, le ministre de l'instruction publique redoutent, pour leur part, l'introduction d'une nouveauté exigeant des remaniements de programme, parfois aussi des froissements d'idées.

Le monde savant se déclare, en général, favorable. Mais le temps manque aux savants pour pousser

(1) Extrait de « L'Indépendance Belge » du 30 octobre 1906. Voyez notre numéro 54 et les suivants.

## Al la internacia helpanta lingvo. (1)

III

### Aplikado de leĝo pri Kaŭzacio al la Problemo de l' instruado de la lingvoj.

(*Daŭrigo*).

Mi devas diri, kun malĝojo, kiel ofte, post ke mi prezentis la demandon pri Esperanto al « kompetentaj homoj », post ke mi montris al li, eksperimente, la solvon de la demando pri la lingvoj ĝis nun nesolvita, mi devis konstati aŭ indiferentecon aŭ, tio estas pli bedaŭrinda, kvazaŭ malamikecon nekonscian, (tiel almenaŭ mi kredas), kontraŭ tiu novaĵo, kiu povus malgrandigi, ekzemple, la « negoceblan » valoron de homo scianta tri lingvojn.

La profesoro de lingvoj, la poliglota inĝeniero, la multlingva advokato, k. c... restas sub la impreso ke ilia sociala persona stato estus malgrandigita; tio estus nur vera por tiu, kiu ne estus akirinta tian personan staton pro propra vera valoro sed dank' al la ebleco sin prezenti nur kiel « tradukisto ».

La direktoro de lernejo, la ministro de la publika instruado timas, siavice, la enkondukon de novaĵo postulanta rearanĝon de programoj, iafoje ankaŭ kontraŭbatalon pri ideoj.

La sciencularo deklaracias, ĝenerale, ke ĝi estas favora. Sed la scienculoj ne havas sufiĉe da libera

(1) Tradako el ĵurnalo « L'Indépendance Belge » 30a de oktobro 1906; vidu la numeron 54an kaj la sekvantajn.

l'étude de l'esperanto assez loin pour pouvoir employer couramment la langue par la plume et par la parole.

Je ne parlerai pas des « défenseurs de nos langues actuelles » pour qui, si souvent, la parole ne sert qu'à habiller fort grotesquement, fort baroquement, les conceptions d'imaginations que le manque de nourriture saine a rendues exsangues et tuberculeuses ; les poètes sans fonds, les écrivailleurs à tant la ligne, les chevaliers de « la suite à demain », n'ont rien à voir à tout ceci.

Et ainsi, règle très générale et très significative, c'est dans les milieux considérés comme socialement moins élevés que l'esperanto a trouvé ses plus chauds partisans, c'est-à-dire ceux qui se sont astreints à en acquérir l'emploi complet.

Ce sont ces honnêtes et courageuses gens de la grosse masse sociale qu'il faut aller toucher.

Si, dans certaines grandes villes, la chose est relativement facile par l'action personnelle de quelques convaincus, par les conférences et l'organisation de cours, il n'en saurait être de même dans le reste du pays.

Seule l'aide de la presse, qui arrive aujourd'hui dans les moindres recoins, est de nature à augmenter nos forces dans des proportions irrésistibles ; c'est la masse des recrues de la classe sociale moyenne qui entraînera l'élite dirigeante actuelle, retardée dans son adoption de l'esperanto pour les raisons que j'ai dites plus haut.

C'est avec joie que je constate comment nous vient aujourd'hui l'appui de la presse libre, grâce à qui nous semons de plus en plus notre idée dans les terres les plus fertiles, j'entends par là le cerveau de la classe moyenne, de la classe des travailleurs que n'effraie pas la nouveauté, signe de progrès, parce que cette nouveauté, signe de progrès, ne menace pas tantôt une situation acquise, tantôt une réputation de spécialiste, tantôt des intérêts personnels moraux ou matériels.

Il s'agit donc, pour le moment, de densifier le noyau des espérantistes de bonne volonté, parmi le monde qui a besoin de comprendre l'étranger en lui parlant et en lui écrivant ; ce monde est caractérisé par les commis, les expéditeurs de tous nos grands bureaux commerciaux et industriels, par tous les employés que nos sociétés expédient à l'étranger, que ces employés soient des ingénieurs en chef ou de simples commis aux écritures

Viennent ensuite tous les serviteurs des grands, moyens et petits hôtels ; le personnel des chemins de fer, surtout dans les trains internationaux ; le personnel des steamers à voyageurs ; le personnel des administrations des postes, télégraphes et téléphones.

Au-dessus, le personnel de tous les établissements hospitaliers, et, en particulier, de la Croix Rouge.

Puis, les membres des touring-clubs qui sont souvent de braves gens, pouvant se payer un voyage à bicyclette à l'étranger, sans pouvoir se faire accompagner d'un courrier-interprète, etc., etc.

C'est de ce monde, qui doit lutter pour la vie, que nous attendons l'appui le plus effectif ; quand nous ferons nombre, les gouvernements marcheront tout naturellement.

Mais en même temps, dès maintenant, je fais la

tempo por ellerni Esperanton tiel plene ke ili povu uzi flue la lingvon, skribe kaj parole.

Mi ne parolos pri la « defendantoj de niaj nunaj lingvoj » al kiuj, tre ofte, la parolo nur utilas por groteske kaj tute fantazie vesti la elpensojn de spiritoj kiuj fariĝis kvazaŭ sensangaj kaj tuberkulozaj pro manko de saniga nutro ; la poetoj sen ideoj, la skribaĉantoj pagitaj laŭlinie, la kavaliroj de la « daŭrigo venos », estas tute nekapablaj esplori la aferon.

Kaj tiel, regulo tre ĝenerala kaj tre signifa, Esperanto renkontis siajn plej entuziasmajn partianojn inter la personoj de sociala rango ne tre ŝatata ; tiuj humiluloj trudis al si la tutplenan lernon d'Esperanto.

Jen estas la honestaj kaj kuraĝaj homoj, kiujn ni devas varbi el la granda sociala amaso.

Se tiu varbo estas sufiĉe facila en iaj ĉefaj urboj per persona agado de kelkaj samideanoj, per paroladoj kaj organizo de kursoj, tio ne povas same okazi en la aliaj partoj de la lando.

Nur la helpo de l' gazetaro, kiu alfluas nune en la plej kaŝitaj vilaĝoj, povas pligrandigi nian forton, laŭ nekalkulebla grado ; la amaso de la varbitoj el la meza sociala klaso trudos la aferon al la nuna direktanta eminentularo, kiu prokrastas sian alprenon d'Esperanto pro la kaŭzoj supre diritaj.

Kun ĝojo, mi konstatas kiel alvenas al ni, hodiaŭ, la apogo de la libera gazetaro ; dank' al ĝi ni semas pli kaj pli nian ideon en la tero la plej fruktodona, en la cerboj de la meza klaso, de la klaso da laboristoj, kiujn ne timigas la noveco, signo de progreso, ĉar tiu noveco, signo de progreso, ne minacas ĉu akiratan situacion, ĉu famon de specialisto, ĉu moran aŭ materialan personan profiton.

Jen do nia nuna agado : densigi la grupon da bonvolemaj esperantistoj inter ĉiuj, kiuj bezonas interrilati, skribe aŭ parole kun la alilanduloj ; tiu speciala mondo enhavas la komizon, la ekspediston de ĉiuj niaj ĉefaj oficejoj pri komerco aŭ industrio, ĉiun oficiston kiun niaj societoj komisias en fremda lando, ĉu tiu oficisto estus ĉefinĝeniero, ĉu li estus simpla skribisto.

Kune kun ili estas kuniĝindaj la servistaro de ĉiu granda, meza kaj malgranda gastejo ; la oficistaro de la fervojoj, precipe en la internaciaj vagonaroj ; la oficistaro de la vaporŝipoj por vojaĝantoj ; la oficistaro de la poŝta, telegrafa kaj telefona administracio.

Je rango pli alta, la oficistaro de ĉiu hospitala rifuĝejo kaj, tutspeciale, de la Ruĝa-Kruco.

Ankaŭ, la membroj de la Turing-Kluboj, kiuj ofte estas honestuloj kapablaj por vojaĝadi biciklede en fremda lando, sed ne por pagi kunvojaĝanton, kiel kuriero-tradukiston, k. c., k. c.

De tiu mondo, kiu devas batali por vivo, ni atendas apogon la plej plenan ; kiam ni estos multnombraj, la regnestraroj agos, tutnature.

Sed samtempe, kaj de nun, mi prezentas la sek-



proposition suivante : dans toutes nos écoles introduire le plus tôt possible l'enseignement de l'esperanto ; ne rien changer pour le moment à l'enseignement des autres langues ; hâter le moment où l'emploi de l'esperanto, langue seconde, la même pour tous, sera assez répandu pour qu'on puisse, sans inconvénient, supprimer l'enseignement des langues étrangères ; à partir de cet heureux moment, pousser à fond, dans chaque pays, l'étude de la langue maternelle, en ne maintenant plus à côté d'elle, pour le monde non-linguiste, que l'étude de l'esperanto.

Avec un peu de bonne volonté de la part de tous et de chacun, ce programme se pourrait se réaliser en quinze à vingt ans.

Dès lors, on ne perdrait plus un temps précieux à étudier les langues pour ne pas les savoir ; on gagnerait chaque semaine une dizaine d'heures à consacrer aux sciences naturelles,dont l'acquisition est d'une importance autrement haute que l'acquisition des « finesses » et des « finasseries » d'une langue quelconque, quoi qu'en pensent les apprentis-pontifes pour qui les mots ont d'autant plus de prix .. naturellement, qu'ils sont payés !

J'appelle à la rescousse, pour combattre ce bon combat — ainsi qu'on disait chez les Grecs, — tous ceux que ne rebutent pas, de prime abord, une tâche ardue et ingrate. L'histoire des siècles passés prouve, par des milliers d'exemples, que chacune des victoires de la Science n'a été remportée qu'au prix du sang de ses soldats. Mais si, autrefois, on brûlait vifs ceux qui osaient s'élever contre les erreurs de leur siècle ; si, plus tard, on se contenta de les emprisonner, aujourd'hui, du moins, on se montre plus humain.

En est-on pour cela plus tolérant ?

Ce serait une question à examiner.

Sans doute, les questions nouvelles de la science — de même que les inventions — sont accueillies avec empressement. Mais, lorsque les vérités qu'on proclame tendent au renversement plus ou moins considérable de l'édifice savant du siècle, lorsqu'elles sapent ces opinions reçues que la génération tout entière a sucées avec le lait maternel, et dont elle est tellement imbue qu'il semble que la matière même de son esprit en soit formée, il ne paraît pas bien sûr que ces vérités soient accueillies avec la même joie.

Les bûchers d'autrefois sont remplacés par des condamnations académiques; l'emprisonnement par la conspiration du silence ; l'exil, par l'exclusion des corps savants ; les confiscations et les amendes, par des imputations d'ignorance, de présomption, d'orgueil, voire d'illuminisme et autre du même genre.

Parfois, on fait mieux encore : on transforme la vérité mise au jour, avant de la combattre, et on la transforme au point de lui faire dire exactement le contraire de ce qu'elle énonce réellement — ce qui procure une victoire facile. De ce que j'avance ici, je pourrais fournir plus d'une preuve prise dans l'histoire contemporaine ; mais, je me borne à en tirer cette conclusion, que si les manifestations de l'intolérance scientifique varient avec les époques, cette intolérance elle-même persiste.

Et, pourtant, cette même histoire prouve que la vérité finit toujours par triompher de l'erreur, mal-

vantan proponon : en ĉiu lernejo, enkonduki kiel eble la plej frue la lernadon de Esperanto ; ne ŝanĝi, nune, la instruadon de la aliaj lingvoj ; rapidi al la momento je kiu uzo de Esperanto, la lingvo dua, la sama por ĉiuj, estos sufiĉe disvastigita por ke oni povu, sen malutilo, forigi la instruadon de la fremdaj lingvoj ; de tiu feliĉa momento, tutplene studi, en ĉiu lando, la gepatran lingvon, nur starigante, flanke de ĝi, por la nelingvista mondo, la studon de Esperanto.

Kun iom da bonvola helpo de ĉiuj kaj de ĉiu, tiu programo povas efektiviĝi post periodo da dekkvin je dudek jaroj.

Tiam, oni ne plu perdos utilan tempon lernante lingvojn por nescii ilin ; oni profitos, ĉiusemajne, ĉirkaŭ dek horojn, por lernado de la naturaj sciencoj, de kiuj la akiro estas multe pli necesa ol la akiro de la « spriteco » kaj « spritaĉo » de ia lingvo, kion ajn opinias pri tio, la majstraĉoj al kiuj la vortoj ŝajnas tiom pli sonoraj, ke ili estas pli sensencaj kaj tiom pli valoraj... kompreneble, ke ili estas monepagitaj.

Mi vokas plenhelpon, por batali tiun bonan bataladon — laŭ la greka esprimo — de ĉiuj, kiujn ne malkuraĝigas, en la komenco, tre malfacila kaj neloganta tasko. La historio de la pasintaj jarcentoj pruvas, per miloj da ekzemploj, ke ĉiu venko de la scienco kostis la sangon de ĝiaj soldatoj.

Sed se, en la pasinta tempo, oni vivbruligis tiujn, kiuj kuraĝis stariĝi kontraŭ la eraroj de sia jarcento ; se en tempo pli proksima, oni nur malliberigis ilin, hodiaŭ, almenaŭ, oni fariĝis pli humana.

Ĉu konsekvence oni estas pli tolerema ?

Tiu demando estus inda por esplori.

Sendube, la novaj demandoj pri scienco — ankaŭ la elpensaĵoj — estaj akceptitaj kun granda bonvolo. Sed se la proklamita vero kondukas al la renverso pli aŭ malpli plena de la scienca monumento starigita de l' jarcento : se la nova vero subfosas tiujn akceptitajn opiniojn, kiujn la tuta generacio suĉis kun la patrina lakto, kaj al kiuj tiu generacio tiel konfidas ke la materio mem de ĝia spirito ŝajnas deveni el tiuj opinioj ; tiam ne estas certa ke tiu vero estus akceptata kun sama ĝojo.

La fajra ŝtiparo de la antaŭaj tempoj estas anstataŭigita per akademiaj kondamnoj ; la malliberigo per silenta konspiro ; la ekzilo per la forpelo el la sciencaj kompanioj ; la konfiskoj kaj la monaj punoj, per falsaj kulpigoj pri malklereco, tromemfido, malhumileco, eĉ kimereco k, t. p.

Iafoje oni agas ankoraŭ plibone : oni aliformigas la junaskitan veron antaŭ ĝin kontraŭbatali, kaj oni ĝin aliformigas tiamaniere, ke ĝi ŝajnas diri ĝuste la malon de tio, kion ĝi reale diras — kaj tiel elvenas facila venko. Pri tio, kiom mi tie ĉi deklaracias, mi povus prezenti pli ol unu pruvon ĉerpitan el la nuntempa historio ; sed mi haltiĝos kaj nur konkludos ke, se la elmontroj de la scienca netoleremo diversiĝas laŭ la epokoj, tiu netoleremo mem persistas.

Tamen, tiu historio mem pruvas ke fine la vero ĉiam venkas la eraron, malgraŭ la sanga kaj tirana

gré les oppositions sanguinaires et tyranniques des siècles passés, mesquines et tracassières de ce siècle-ci.

L'esperanto est une vérité en marche; ses adversaires de bonne foi s'y rallieront tôt ou tard.

Les autres . pfff !

J'aborderai prochainement l'histoire de la formation du langage.

Commandant CH. LEMAIRE.

*P. S.* — Dans mon dernier article, je disais que l'on ne trouvait dans aucun traité, autre que celui de Girard, mention de la « loi de causation ».

Le commandant Collon, de l'artillerie, me signale qu'il a fait application de cette loi dans son *Manuel pratique des tirs collectifs*. Je suis heureux de trouver pareil appui, car le distingué officier qu'est mon camarade Collon, a pris dans le monde scientifique militaire une place à juste titre très en vue. Je me suis rappelé avec plaisir qu'il y a quelque bientôt vingt ans,je l'aidai à préparer ses examens de sous-lieutenant : qu'il reçoive ici toutes mes félicitations pour la façon brillante dont il parcourt la carrière.

Com$^{t}$ CH. L.

kontraŭago de la pasintaj jarcentoj, malgraŭ la malgrandanima kaj enuiganta kontraŭago de tiu ĉi jarcento.

Esperanto estas « vero marŝanta » ; ĝiaj kontraŭuloj sinceraj alvenos al ĝi, frue aŭ malfrue.

Pri la aliaj... pfft !

Mi komencos baldaŭ la historion pri la formiĝo de l' parolo.

Komandanto CH. LEMAIRE.

P S. En mia antaŭa artikolo, mi diris ke en nenia verko, krom tiu de Girard, oni parolas pri la « leĝo pri kaŭzacio ».

La komandanto de artilerio Collon, sciigas al mi ke li aplikadis tiun leĝon en sia *Manuel pratique des tirs collectifs*. (Praktika lernolibro de la opaj pafadoj). Mi estas feliĉa renkonti tielan apogon, ĉar la eminenta oficiro, mia kolego Collon, akiris en la scienca mondo militista, rangon ĝuste tre ŝatindan. Plezure mi memoras ke antaŭ preskaŭ dudek jaroj, mi lin helpis dum la preparado de liaj ekzamenoj de subleŭtenanto ; li ricevu, tie ĉi, mian tutkoran gratulon por la rimarkinda maniero je kiu li plenumas sian profesion.

*Tradukis Jos. Jamin.* K$^{o}$ CH. L.

## NEPRE SIMPLECO ! NEPRE KLARECO !

En français le renversement de position de l'adjectif et du substantif conjoints peut modifier totalement la signification du groupe. Homme grand et grand homme sont deux choses nettement différentes.

Mais le cas n'est pas général.

Arbre grand et grand arbre sont choses identiques. En esperanto il importe de n'introduire pas de tels « distinguo », puérils et inutiles à une langue un peu logique.

On y arrivera en traduisant toujours l'idée, sans plus Mais déjà a-t-on oublié ce principe capital. Et les commentateurs ont eu beau jeu à expliquer leur traduction de : « Je trouve le bon vin », et de « Je trouve le vin bon ». Ils ont traduit la première phrase par : « mi trovas la vinon bonan », et la seconde par « mi trovas la vinon bona ». Nous nous permettrons de trouver ce truc peu compatible avec les ressources de la logique espérantiste.

Quand on dit : « Je trouve le bon vin » on entend dire qu'on a fait une recherche spéciale parmi divers vins, ou diverses bouteilles, etc., et que, finalement, on a mis la main sur le bon vin

Il s'agit bien alors d'une trouvaille, résultat d'une recherche, et dès lors il faut dire : « mi trovas la vinon bonan », ou « mi trovas la bonan vinon ».

Quand on dit : « Je trouve le vin bon », on veut dire qu'on a dégusté certain vin et qu'on est d'avis qu'il est bon. Dans le cas présent on n'a nullement cherché tel ou tel vin ; on n'a procédé à aucune recherche ; on a fait seulement œuvre de dégustateur. Et c'est cela qu'il faut exprimer.

Ce qui se fait fort simplement, fort clairement, en disant : « A mon goût ce vin est bon » ou bien « Je suis d'avis que le vin est bon ».

En la franca lingvo ŝe oni interŝanĝas la lokon de adjektivo kaj substantivo kunigitaj, oni povas tute ŝanĝi la signifon de l' grupo. « Homme grand » kaj « grand homme » estas du aferoj tute nesimilaj.

Sed la regulo ne estas ĝenerala.

« Arbre grand » kaj « grand arbre » estas aferoj tute identaj. Pri Esperanto estas necesa ke oni ne enkonduku tielajn « *distinguo* », tute senutilajn en lingvo iom logika.

Oni atingos la celon kondiĉe ke oni ĉiam traduku la ideon, simple. Sed oni jam forgesis tiun gravan principon kaj la komentariistoj jam penadis kaj klopodis por zorge klarigi la tradukon de « mi trovas la vinon bonan » kaj « mi trovas la vinon bona ». Por ili la unuan frazon oni devas traduki : « je trouve le bon vin », kaj la duan : « je trouve le vin bon ». Ni permesas al ni opinii ke tia rimedaĉo tute ne taŭgas kaj ne akordiĝas kun la logikeco d' Esperanto.

Ĉu oni diras : « je trouve le bon vin », oni intencas diri ke oni speciale serĉis, eĉ serĉadis, inter diversaj vinoj, aŭ inter diversaj boteloj, k. c... kaj fine oni sukcesis meti la manon sur la botelo da bona vino.

En tiu okazo oni okupas sin je trovaĵo, sekvo de serĉado ; pro tio oni devas diri « mi trovas la vinon bonan », aŭ « mi trovas la bonan vinon ».

Ĉu oni diras : « Je trouve le vin bon », oni intencas diri ke oni gustumis, gustumadis ian vinon, kaj fine oni opiniis ke ĝi estas bona. En ĉi tiu okazo oni tute ne serĉis tiun aŭ tiun ĉi vinon ; oni faris neniam serĉadon ; oni agis nur kiel gustumisto. Kaj tion, nur tion, oni devas esprimi.

Afero tre simpla, tre klara, kondiĉe ke oni diru : « laŭ mia gusto, tiu vino estas bona » aŭ « mi bonopinias la vinon ».

En Esperanto : « laŭ mia gusto la vino estas bona », ou « mi bonopinias la vinon. »



Peut-être admettra-t-on plus aisément cette façon de voir, si on veut bien considérer cette autre phrase :

« J'aime le bon vin » ; elle est tout à fait identique, comme signification, à cette autre « j'aime le vin bon ».

Et l'on aurait beau, ici, donner deux traductions espérantistes, savoir : « mi amas la vinon bonan », et « mi amas la vinon bona », on ne changerait pas le fait, qui est unique.

D'où cette différence ?

Simplement de ce que, ici, le mot « aimer » n'a qu'un seul sens, tandis que « trouver » en avait deux, savoir son sens propre, puis le sens figuré « estimer, juger, être d'avis ».

Et cela montre bien que c'est le verbe qu'il fallait faire varier en Esperanto, et non la syntaxe.

Enfin signalons qu'il n'est guère espérantiste de traduire « j'aime le bon vin » par « mi amas la bonan vinon ». On aime son amie mais on n'aime pas les huîtres, on les apprécie, on les estime à leur juste valeur, on les « ŝatas ».

Et l'on dit : « mi ŝatas la bonan vinon kaj la ostrojn ». B. S.

Eble oni konsentos pli facile pri tia vidmaniero se oni konsideras la sekvantan frazon : « j'aime le bon vin » ; ĝi estas tute identa, kiel signifo, je la sekvanta : « j'aime le vin bon ».

Nu ! en tiu ĉi okazo,donu du diversajn tradukaĵojn esperantistajn pri tiuj frazoj, ekzemple : « mi amas la vinon bonan » kaj « mi amas la vinon bona » ; ĉu vi ŝanĝos la aferon, kiu estas unika ?

Pro kio tiu diferenco ?

Simple pro tio ke, ĉi tie, la vorto « ami » havas nur unu signifon, tiam kiam « trovi » havis du tre malsamajn signifojn, t. e. sia ordinara kaj propra signifo, kaj ankaŭ la figura signifo « opinii,juĝi » k.c.

Nu ! Tio sufiĉe montras ke, en Esperanto, oni devas ŝanĝi la verbon, ne la sintakson.

Fine ni diru ke lerta esperantisto ne diros « mi amas la bonan vinon ». Oni amas amikinon, sed ĉu oni amas ostrojn ? Oni ŝatas ilin.

Kaj oni diras : « mi ŝatas la bonan vinon kaj la ostrojn ». B. S.

## BELGA LIGO ESPERANTISTA

### PROTOKOLA RAPORTO.

La komitato de la Belga Ligo Esperantista kunvenis en Lieĝo je la dimanĉo 7$^{a}$ aprilo, sub la prezido de S$^{ro}$ A. Vander Biest-Andelhof, vic-prezidanto de la Ligo. Ĉeestis je la kunveno : Fraŭlino E. Lecointe, S$^{roj}$ L. Blanjean, H. Calais, Jos. Jamin, Ed. Mathieu, M. Seynaeve kaj A. Vander Biest. S$^{ro}$ Centner, de la Esperantista Societo el Verviers, anstataŭigas S$^{ron}$ Palmer kaj S$^{ro}$ leŭtenanto kolonelo E. de Troyer, prezidanto de la Grupo Esperantista en Lieĝo, anstataŭigas S$^{ron}$ Sloutzky. S$^{roj}$ komandanto Ch. Lemaire, R. Van Melckebeke kaj J. Coox sciigis ke ili ne povis ĉeesti pro diversaj kaŭzoj.

La prezidanto salutas la alestantojn kaj komencas ekzamenon de la tagordo je la 11$^{a}$ horo preciza. Post lego de la protokolo de la antaŭa kunveno kaj de la regularoj de la novaj grupoj rogantaj aliĝon al la Ligo, oni unuvoĉe akceptas enligon de la grupoj : Bruĝa grupo Esperantista el Bruges, Liera grupo Esperantista el Lierre kaj Pioniro, Esperantista brusela grupo el Bruxelles. La novaj delegitoj ĉeestantaj estas Fraŭlino Guilliaume kaj S$^{ro}$ O. Chalon por la grupo Pioniro, kaj S$^{ro}$ A. J. Witteryck por la Bruĝa grupo; S$^{ro}$ Mengal, prezidanto kaj delegito de la Liera grupo senkulpigis sin pro sia foresto.

La prezidanto deziras bonvenon al la delegitoj kaj esperas ke ili alportos sian ŝatindan helpon al nia laborado. La sekretario prezentas kelkajn rimarkojn pri nia agado de la antaŭa kunsido. Ke kaj novaj grupoj, ne ankoraŭ ligitaj, stariĝis; inter ili Verda Stelo en Antverpeno kaj grupoj en Berchem, Antoing, Namur, k. c. Inviton ni adresis al ili por ke aliĝo al la Ligo baldaŭ okazu; saman inviton ni prezentos al la grupo « Esperanto » en Spa, laŭ propono farita de S$^{ro}$ Ed. Mathieu.

S$^{ro}$ Van der Biest anoncas ke la Antverpena grupo intencas partopreni al ekspozicio en Antverpeno kaj deziras helpon de la Ligo en tiu okazo; S$^{ro}$ de Troyer esperas ke baldaŭ oni povos ankaŭ organizi en Lieĝo ekspozicion, kiu multe helpos tie nian propagandon. La Ligo decidas ke ĝia helpo estas certigita al tiuj ekspozicioj, ĝi pruntedonos la dokumentojn, kiujn ĝi posedas, sed kondiĉe ke la organizo estu afero tute loka. La Esperantista Societo el Verviers intencas ankaŭ organizi dum la somero ekspozicion Spa-Verviers per siaj propraj rimedoj kaj kun helpo de la Ligo.

La ĉeestantaro ekzamenas la demandon pri oficialaj konsulejoj. La sekretario klarigas la nunan staton kaj la intencon de la deziro voĉdonita de la kongreso el Genevo : la konsulejoj povas sin krei tutlibere, sen respondeco kaj sen garantio, tamen apogo de ia organismo, societo, grupo aŭ ligo, estas almenaŭ dezirinda.

En nia patrolando, La Belga Sonorilo publikigis nomaron de konsuloj tute provizoran, ĉar la plimulto el la difinitaj anoj ne povas akcepti tiun funkcion. Estas do necesa ke la Ligo prenu sur sin la starigon de konsulejoj difinitaj laŭ kelkaj reguloj.

La diskuto komencas, al kiu partoprenas preskaŭ ĉiuj komitatanoj. Intersekve oni esploras la demandojn pri nombro de la konsuloj, pri iliaj devoj kaj agoj, la elspezojn okazitajn de ilia pli aŭ malpli agema prizorgo kaj repagon de tiuj elspezoj. Kelkaj membroj opinias ke, ĉar starigo de konsuloj estas precipe afero komerca, oni devas akcepti por ili komercan organizon. S$^{ro}$ Blanjean avertas ke, laŭ la intenco de la kongreso, la konsulo estas precipe agento de propagando kaj devas respondi la plej akurate, al ĉiuj demandoj, kiuj povus helpi la ĝeneralan disvastigon de la lingvo. La diskuto daŭrigas iom flanke.

Fine, la komitato voĉdonas kaj starigas la sekvantan regularon pri fondo de konsulejoj :

